

Rifuzas Kanalo Eŝropo por Kubo novajn agresojn de Usono



Parizo, jul 6 (RHK) La kanalo Eŝropo por Kubo malakceptis la akuzojn de la usona registaro kontraŭ la insulo en ties unuflanka raporto pri homa kontrabando, kiun ĝi konsideris kiel nova instrumento de agreso.

Ni kondamnas ĝi tiujn falsakuzojn, enmetitajn en la dokumento prezentita la 1-an de julio de ĝtata sekretario Antony Blinken, raporto, kiu, krom malhavi internacian kaj moralan aŭtoritaton, respondas al kalumniaj celoj, substrekis la platformo de solidareco kun Kubo kaj ĝia Revolucio, iniciato aktivigita en oktobro pasintjare.

La kanalo enkadrigis la novajn akuzojn kontraŭ la kariba lando en la sama celo de politika ĝantaŭo kiel ĝia enigo en la liston de nacioj sponsorantaj terorismojn, decido anoncita en januaro de la tiama usona prezidento Donald Trump, nur kelkajn tagojn antaŭ forlasi la Blankan Domon.

Vaŝingtono atentigis, ke Kubo nesufiĝe plenumas la minimumajn normojn por forigo de homa kontrabando kaj ne faras signifajn klopodojn tiucele, unuflanka kriterio, kiun la plej granda el Antiloj pritaksis kiel novajn mensogojn, kiuj provas senkreditigi la insulan medicinan kunlaboron kun aliaj popoloj, rekonita tutmonde.

La Eŭropo por Kubo, la usona registaro pliigas sian malhonoron provante kaŝi per novaj politikaj aparatoj la ekonomian sufokigon, kiun ŝi trudis sur la insulo dum pli ol 60 jaroj per sia ekonomia, komerca kaj financa blokado.

La solidara platformo ankaŭ malakceptis la negativon de vizoj al la kuba futbala teamo por partopreni en la Ora Pokalo, turniro bazita sur usona teritorio.

Ĝi ripetis sian kondamnon pri la usona krucmilito kontraŭ Kubo kaj la fakto, ke ŝi eĉ ne ŝesis dum la monda krizo kaŭzita de la pandemio Covid-19.

Fonto: PL

<https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/262968-rifuzas-kanalo-europo-por-kubo-novajn-agresojn-de-usono>



Radio Habana Cuba